

Nº 04
1967

G.L.GIMELLI

# ITALA fervojisto

Organo
Associazione
Italiana
Ferrovieri
Esperantisti





IFEA

## CODICE DI AVVIAMENTO POSTALE (I-40128) = POŜTA KODO

Dal 1° luglio 1967 tutti gli indirizzi apposti sugli invii postali dovranno essere completati con il numero di codice della località di destino. Il numero di codice dovrà precedere l'indicazione della località e non dovrà in alcun caso essere sottolineato. Il nostro indirizzo completo é: G.G. oppure I.F.E.A. - Via Donato Creti, 61 - I-40128 - BOLOGNA (Italio).

Si interessano i nostri lettori, in modo particolare quelli residenti nelle Città di: Bari, Bologna, Catania, Firenze, Genova, Milano, Napoli, Palermo, Roma, Torino, Trieste e Venezia, di volerci indicare, con ogni possibile urgenza, il loro numero di Codice di Avviamento Postale per aggiornare il nostro indirizzario. Ringraziamenti anticipati.

## ESPERANTO-MANIFESTACIO EN VERCELLI (ITALUJO)

Dimanĉon, la 25-an de junio, proksimume ducent esperantistoj, inter kiuj multaj fervojistoj kiuj alvenis de Bologna kaj de aliaj urboj, festis la dekan jarrevenon de la fondiĝo de la Esperanta Grupo de Vercelli.

P. Urbaitis, Lituana Pastro, celebris la Sanktan Meson en Esperanto, kiun ĉeestis ankaŭ la Ministro pri Trafiko kaj Civila Aviado, Hon. Oscar Luigi Scalfaro, kiu respondecas pri Italaj Ŝtataj Fervojoj kies Ĝenerala Direkcio estas ĉefa branĉo de tiu Ministerio.

La solenaĵo pri la dekjara jubileo de la Grupo disvolviĝis en ĉeesto de Senatano Bertola, Deputito Franzo kaj Ministro Scalfaro. Ĉi lasta, post la saluto de la reprezentantoj el Nederlando, Germanujo kaj Venezuelo, prezentita de D-ro Mario Sola, faris la festparoladon. Ministro Scalfaro interalie diris kuraĝigajn vortojn por la esperantistoj, de kiuj li laŭdis la fervoron, la iniciatemon kaj la fidelecon al idealo de homa komprenemo, kiu konas nek limoj nek baroj. Krome li promesis sian apogon kaj helpon por la aldono de la Esperanto-teksto en la sciigoj de la Ĝenerala Fervoja horaro.

La Prezidanto de la Itala Esperanto-Federacio, d-ro Umberto Stoppoloni, dankis je la nomo de ĉiuj kunvenintoj la Ministron pro liaj vortoj, kaj la Grupo de Vercelli en la persono de Geom. Praglia kaj de gesinjoroj Sola.

Post la disdonado de kelkaj kartoj de honora membreco al la Grupo al la Ministro, al la Urbestro de Vercelli, al la loka skabeno pri Publika Instruado kaj al aliaj eminentuloj, kiuj konkrete montris sian simpation al la Esperanto-movado, la ĉeestantoj iris al la Urbodomo, kie ilin akceptis la Urbestro kaj aliaj aŭtoritatoj por honora vermuto.

Post luksa komuna bankedo en eleganta restoracio, oni lotumis multajn belajn premiojn. Fermis la ĉarman manifestacion la jam tradicia "Trezorĉaso" en la urba publika ĝardeno.

## 40-JARA JUBILEO DE INTERNACIA ESPERANTO-MUZEO EN WIEN
## 90-a NASKIĜTAGO DE KORTEGA KONSILISTO HUGO STEINER

Kortega Konsilisto Hugo STEINER la 26-an de februaro 1968-a festos sian 90-an naskiĝtagon, sed Internacia Esperanto Muzeo en Wien (I.E.M.W.) jam nun festas sian 40-jaran jubileon, sajnas preskaŭ neeble apartigi ambaŭ memortagojn, ĉar jam la vivokuro de Hugo Steiner estas tro intime ligita kun la sorto de la I.E.M.W..

La Italaj Fervojistoj Esperantistoj tiuokaze sendas al la Internacia Esperanto Muzeo en Wien kaj al la "kolego" Hugo Steiner la plej varmajn bondezirojn.

## 4-a INTERNACIA KONGRESO - BRUGGE 22, 23, 24 de septembro

La 4-an Internacian Kongreson de Staciestroj, rajtas partopreni la staciestroj kaj kandidatstaciestroj deĵorantaj en tuta Eŭropo. Ĉiu parolas en sia nacia lingvo, aŭ rekte en la traduklingvoj franca aŭ germana, kaj ek de ĉi tiu jaro ankaŭ en Esperanto. Alloga programo kun antaŭkongreso kaj postkongreso en Bruselo. Por la Esperanto organizado: S-roj L.de BRUYNE, Staciestro Linkebeek. N.van SEPYBROEK, Substaciestro Brugge (Belgio).

## GAZETOJ RICEVITAJ

(Estas indikitaj la plej lasta numero ricevita) Unua parto

- Esperanto=Revuo Internacia = Oficiala Organo de U.E.A. (En konsultaj rilatoj kun UNESCO) = N-ro 740-1 (7-8) julio/aŭgusto 1967 - 60-a jaro.
- La Praktiko-La Gazeto kiu instruas kaj amuzas = N-ro 6 (356) Junio 1967.
- Heroldo de Esperanto=Duonmonata Internacia Organo de la Esperanto-Movado= N-ro 11 (1438) 16 julio 1967. Fondita en 1920 - 43-a Jarkolekto.
- Informilo de Internacia Esperanto Muzeo en Wien = 18.jaro, 3 (67) Aŭg.1967.
- Oomoto - Monata Organo de Oomoto kaj U.H.A.- 29-a Jaro N-ro 321-322. Marto-Aprilo 1967.
- I.O.E.-Gazeto-Organo de Internacia Instituto por Oficialigo de Esperanto= Majo-Junio 1967 = Jaro II N-ro 5-6 (10-11).
- Espero Katolika-Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista-Monata Revuo fondita en 1903. Jarkolekto 64 n-ro 579 (6/67) junio 1967.
- La Internacia Fervojisto-Organo de I.F.E.F."La Internacia Fervojista Esperanto Federacio" = N-ro 4 majo-junio-julio 1967 - Jaro 19-a.
- Bulteno de la Aŭstria Federacio Esperantista Fervojista = Aperas 4-6 foje po jaro. Jaro 12-a. n-ro 2 Junio 1967.
- Relvoko-Organo de la Belga Esperanto Fervojista Asocio = n-ro 2/1965.
- Jen-Bulteno de la Brita Asocio de Esperantistaj Fervojistoj = Nova Serio N-ro 15 Januaro 1967.
- DEFA-Bulteno = Membra Organo de Dana Esperantista Fervojista Asocio. 20-a jareldono. N-ro 6 Junio 1967.
- Bulteno de Esperanto Societo de Finnlandaj Fervojistoj. N-ro 2 (9) 1966.
- Esperanto fervojisto. Organo de la Franca-IFEF-Sekcio. N-ro 228 Julio 1967.
- Bulteno = Germana Esperanta Fervojista Asocio. Fondita 1952. Numero 4. Julio/Aŭgusto 1967.
- Hungara Fervojista Mondo=Kvaronjara Revuo de la Fervojista Esperanto-Movado en Hungarujo. XI-a Jaro-1967. N-ro 1 Januaro-marto 1967.
- Jugoslavia Fervojisto-Organo de Jugoslavia Asocio de Fervojistoj Esperantistoj = Jaro XI. N-ro 2 Junio 1966.
- Fervojisto-Organo de la Fervojista Esperantista Rondo Nederlanda. 21-a jaro. n-ro 7 Julio 1967.
- Svisa Fervojisto-Bulteno de la Svisa Asocio de Esperanto-Fervojistoj = N-ro 46 junio 1967.
- Raitis Rautatielainen=Enhavas paĝoj pri Fervojista Esperanto-Movado de Finlando. N-ro 5-6 majo-junio 1967.
- Norvega Esperantisto-Organo de Norvega Esperantista Ligo. N-ro 5/6 1967. 3-a periodo, 33-a (38-a) jaro. Monata. Enhavas Fervojista Paĝo. Organo de Norvega Esperantista Fervojista Asocio (NEFA) ekde la monato de marto 1967.
- FERREUROPE-Fer-Europ. Bulletin d'Information de l'A.E.C. (Association Européenne des Cheminots).Itala Sekcio. Junio-Julio 1967 N-ro 6-7. Jaro V-a.
- NOTIZIARIO D.L.F. Bologna. Monata gazeto de "Dopolavoro Ferroviario" Bologna. Jaro II. N-ro 6-7 Junio-Julio 1967.

(daŭrigos)

### ANNUNCIO IMPORTANTE

Per aggiornare il nostro schedario preghiamo vivamente chi riceve il presente bollettino come scambio o come omaggio, di volerne confermare il ricevimento ed il gradimento. Chi non gradisce riceverlo é pregato di farlo presente alla redazione: Via Donato Creti, 61 BOLOGNA (Italia).

## ESPERANTO EN LA RADIO

RADIO ROMA - ESPERANTO - Casella Postale 320. I-00100 ROMA (Italia)

SEPTEMBRO 1967-a: 2116 dimanĉon la 3-an: La vulkano Etno - 2117 dimanĉon la 10-an: Tra la literaturo - 2118 dimanĉon la 17-an: Italaj kanzonoj en Esperanto - 2119 dimanĉon la 24-an: Leterkesto. Redaktoro: Kav.Luigi MINNAJA. La dissendoj okazas de h.21 ĝis 21,20 (M.E.T.); ondlongoj mt.25,42-30,90-41,24